

19473/41

(1972)

esperant

Bulgara

ESPERANTISTO



E N H A V O

Ivan Vandov. Granda batalanto por belarta kulturo	1
A. Vaičiulis. Maksim Gorkij kaj Esperanto	2
Blaga Dimitrova. Inter la brigadanoj. Trad. Violin Oljanov	3
Georgi Dimitrov. El la konkluda parolado antaŭ la faŝista tribunalo en Leipzig	4
Ĥristo Gorov. Esperanto en la faŝistaj malliberejoj	5
Kunĉo Vălev. Paisij Ĥilendarski	6
Ivan Vazov. Paisij. Trad. Asen Grigorov	6
Dimitr Izmirlijev. La popola instruisto, junulara gvidanto kaj revoluciulo Stoju Ljondev	8
M. Manolova. Denove sur posteno	9
Nina Berĉeva. „Verda Raketo“ jubilas	10
Antonia Spasova. La novefondita E-Sekcio en Ĥaskovo aktivas	11
Genĉo Genĉev. Teoria konferenco de bulgaraj juristoj je alta nivelo	12
Ljubka Nikolova. Celebro de „Vela Peeva“	12
N. Najdenov. SIA en Veliko Târnovo	12
Bojka Batalska. Manifestaĵo de bulgara-ĥungara amikeco .	13
Cv. Todorov, F. Miĥajlova. Novaj Esperanto-societoj; Kaspiĉan, Kalofer	13
Jordan Jordanov. La Esperantista Movado en la distrikto de Smoljan	14
Saulcerite Neilande. Jubilea vespero en Riga E-Klubo . .	15
Ivan Sarafov. „Mi estas Pelé“	15
J. Gold. En Moskva Internacia E-Klubo	16
A. Caricenko. Gelernantoj en Doneck lernas Esperanton . .	16
Nano Nanov. Por via lingva perfektigo: POR, PRO, AL . .	16
Dimute. Slânĉev Brjag	III
* * * Deziras korespondi	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Fotomuntaĵo de John Hartfiela: Georgi Dimitrov antaŭ la faŝista tribunalo en Leipzig 1933

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 4,28 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kcr. 3, kv. 44, V 117 449 Moskva V-449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**GRANDA BATALANTO POR BELARTA KULTURO**

Georgi Dimitrov proksime observis la evoluon de la belarta kulturo kaj lasis valorajn eldirojn pri la socia esenco de la verkado „laŭ la leĝoj de la beleco“.

Vastaj kaj multflankaj estis la interesoj de Georgi Dimitrov. Dank' al sia natura saĝo kaj forta sciemo, en la medio de la laboristoj kaj en proksima amikeco kun elstaraj bulgaraj revoluciaj marksistoj li jam en sia juneco ekhavis kaj disvolvis ĉe si en plej alta grado la strebon esti en proksima kaj aktiva kontakto kun la atingajoj de la literaturo kaj de la aliaj artoj. Jam de sia frua aĝo kaj ĝis siaj lastaj jaroj G. Dimitrov konstante rekonis la signifon de la kulturo, montris ĝian grandan rolon en la vivo de la homo kaj en la evoluo de la socio. Kiel sociaganto li insiste atentigis pri la neceso de kultura altiĝo de la laboristoj. En la kondiĉoj de la popola regpotenco en Bulgario ĝuste li fiksis la taskojn pri konstruado de la „ekonomiaj kaj kulturaj fundamentoj de la socialismo“ en nia lando, tiel destinante unuagradan lokon ankaŭ por la kulturo en la historia revolucia procedo. En multnombraj leteroj, eldiroj kaj salutparoloj li konkrete montris, kian grandan eduksignifon havas la agado, kiun disvolvas (kaj ĉiam pli aktive kaj pli trafe devas disvolvi) la diversaj kulturinstitutoj.

Speciale gravaj kaj aktualaj estas la pensoj de G. Dimitrov pri la literaturo. Vaste konataj estas liaj vortoj pri la influo, kiun havis sur li la heroo Raĥmetov el la romano „Kion fari“ de la rusa verkisto-demokrato Nikolaj Ĉerniŝevskij. Eĉ en la berlina malliberejo Moabit Dimitrov legis kaj relegis verkojn de la malnovgreka literaturo, de Molière, Shakespeare (Ŝekspir), V. Hugo, A. France, Freiligrath (Frajligrat), Goethe kaj aliaj aŭtoroj. En parolado antaŭ kunveno de l' Asocio de la Sovetaj Verkistoj li disvolvis la tezon, ke la belarto devas eduki revoluciulojn. „Ili edukiĝas, — diris Dimitrov, — en la praktika batalo kaj laŭ la fortaj, riĉaj herooj de la belarto.“ En la sama parolado li montris grandan atenton ankaŭ al la demando pri la belarta formo kaj la arleca nivelo de la literaturaj verkoj, kategorie neante la memcelan estetismon. Laŭ Dimitrov en la literaturo la leginto devas trovi modelojn, imitindajn ekzemplojn. Revolucia verkisto estas ne tiu, kiu nur ripetas „Vivu la revolucio!“, sed tiu, kiu per la efikforto de siaj verkoj „kontribuas por la revolucio de la laboramasoj, mobilizas ilin al batalo kontraŭ la malamiko.“ En sia saluto al la Unua Kongreso de la Sovetaj Verkistoj en 1934 Dimitrov vokis la literatorojn en Sovetunio doni al la mondo „novajn, brilajn, fortajn kaj artece-verajn bildojn de la granda batalo kaj la grandaj venkoj en la Lando de la Sovetoj...“

Lia fama unua letero al la Asocio de la Bulgaraj Verkistoj post la Natiĝo de Septembro (de la 14 de majo 1945), kie estas starigita la tasko krei en Bulgario „vere popolan belartan literaturon“, ne neglektas ankaŭ la estetikan nivelon de la verkaro: por eduki ĉe la laboruloj popolamon kaj patriotismon, ankaŭ senton de internacia solidareco, de eterna amikeco kun la soveta popolo kaj por „stimuli al heroecaj faroj en la kampo de la laboro kaj la kulturo, en la batalo por defendo de la popolaj libero kaj rajtoj“, la belarta literaturo devas distingiĝi per „profunda kredindeco kaj alta emocieco“. G. Dimitrov substrekis, ke la popolo bezonas „batalemajn, frapajn versaĵojn“, ke eĉ la raportaĵoj, kiujn proponas la gazetaro, devas esti „vivoplenaj, artecaj, emociaj. Ke ili efiku ne nur la prudenton, sed ankaŭ la koron.“

Tiuj kajaliaj eldiroj de Dimitrov estas alvokoj al kreado de verkoj kun alta idea kaj arteca nivelo. Sekvante tiun ĉi linion, la popola regpotenco en Bulgario konkrete realigas kulturen politikon, kiu kontribuas por kreado de plenvolara en idea-estetika rilato belarta literaturo.

MAKSIM GORKIJ KAJ ESPERANTO

Por sovetaĵ esperantistoj jam ne estas novaĵo, ke la fama rusa soveta verkisto Maksim Gorkij pozitive taksis Esperanton kaj kelkfoje skribis aŭ buŝe esprimis sian opinion pri ĝi. Pri tio antaŭnelonge memorigis ankaŭ la libro, eldonita en Jakutia Aŭtonoma Soveta Socialisma Respubliko sub titolo „Jakutaj amikoj de A. M. Gorkij“ (Jakutskije družja A. M. Gorkovo, kompilintoj A. T. Timšin, I. V. D'stler, Jakutsk 1970). La libro priskribas la vivon de A. A. Semjonov, eminenta sociaganto en Jakutio dum la jaroj antaŭ kaj post la Granda Oktobra Revolucio 1917, substrekante precipe liajn rilatojn kun la granda verkisto.

En la libro oni reprenis kelkajn citaĵojn pri Esperanto el verkoj de A. M. Gorkij, kaj el aliaj fontoj. Ni prezentas ĉi tie du erojn, tradukitajn el eldiroj de M. Gorkij:

La historio de la kulturo okulfrappe montras al ni, ke plej sentimaj gvidantoj de la homaro jam efektivigis ne malmultajn „senprudentajn utopiojn“; pli kaj pli ofte tiuj absurdaj revoj iĝas laboraj hipotezoj de la scienco. Nun al la afero de efektivigo de utopio aliĝas la volo de miloj kaj milionoj da homoj, kaj nun la homaro bezonas unuecan internacian lingvon pli ol iam ajn antaŭe. Se oni forte volas, oni bone faras. La bezonon de unueca lingvo por la internacia proletaro elvokas la unueco de ĝiaj klasaj aspiroj kaj celoj.

Esperanto laŭ mia opinio estas sana ĝermo de internacia lingvo, plene kapabla por plua evoluo. Jam nun Esperanto havas sufiĉe abundan literaturon kaj estas sukcese ellaborata teorie. Tiu ĉi laboro iros konsiderinde pli sukcese kaj pli rapide, se al ĝi oni altiros sciencistojn-filologojn el la medio de

konvinkigintoj pri la neceso de unuiĝo de l'homaro.

Oni asertas: „Lingvo ne evoluas artefare“. Tamen la lingvo, evoluante sufiĉe rapide, iĝas tute natura fenomeno, ĉar ĝi estas konforma al la bezono de la nuntempa homo trovi, krei komane kompreneblan lingvon.

En 1910 mia konato, jakuta civitano Aleksej Semjonov, ĉirkaŭveturis tutan Eŭropon, scipovante nek unu el la eŭropaj lingvoj kaj parolante nur Esperanton. Li faris tion por persone kontroli, kigrade estas disvastiĝinta la „artefarita“ lingvo.

Preskaŭ en ĉiu pli-malpli grava eŭropa urbo li trovis esperantistajn organizaĵojn, hotelojn por esperantistoj, literaturon. Precipe riĉaj per tiaj organizaĵoj evidentigis Italio kaj la havenurboj de Mediteraneo.

(Skrivas sur p. 5)



INTER LA BRIGADANOJ

de Blaga Dimitrova

Novajo disvastiĝis frumatene:

—Hodiaŭ venos li!

—Al ni li venos!

—Ĉu vere?

Kaj la teraĵo iĝis tuj malpeza!

Veturiletoj flugis superplenaj.

Mi kuras,

atingas la antaŭan!

—Vojon donu!

Kaj jen

post mi portiĝas aliul'.

—Vojon donu!

—Vojon!

Pro la kurado

de vent' aŭdiĝas sono.

Nur en krepusko,

ĉe lia ven'

kvietiĝis brigadana vento,

kaj etaj nuboj perlamotaj

ekŝvebis

super monto-ĉen'.

—Sidiĝu!—

diris li mildvoĉe.

—Sidiĝu,

vi estas tiel lacaj!

Li mem staranta restis.

La suno eĉ sidiĝis sur la monton

kvazaŭ por momento,

sed kaptis ĝin la tento

ĝisfine aŭskulti.

Kaj ĉio—

bestoj,

arbustoj,

surŝutaĵoj

kaj altaĵoj

en rond'

sidiĝis ĉirkaŭ li,

la staranta.

Mi vidas lin—

ridetanta,

grizharara,

staranta sur la fono de l' Balkan',

li — same granda kaj fortika,

li — mem giganto ĉe gigant'.

Parolon lian aŭdas mi ankoraŭ,

mallaŭtan, intiman,

sed liaj vortoj flugas foren —

la herboj kaj la spikoj

flustras ilin:

„En la minutoj de la sunsubiro

por revoj

estas ja la temp'.

Nu, revu ni

en ĉi verpero

freŝzefira...“

Kaj li ekrevis voĉe,

kun rigard' al herizont'...

Kaj en la revo,

kun mano altlevita

li sorĉis

ĉion en la mond'.

Subite deflankiĝis la rivero

de sia voj'

ĉizita dum jarmiloj.

Sen ajna bordo grenoj

ondiĝas sub la pluv'

de aviadiloj.

Elkreskis jen

en la kampar' silenta

mirinda urbo.

Kaj ni mem

estiĝis jam allaj —

pli bonaj,

pli belaj,

pli prudentaj...

Parolis li per voĉo de l' estonto

kun mano

super montoj

kaj multjaroj...

Unuan fojon tiam

mi vidis vin,

morgaŭa patrolando kara!

Et la bulgara: Violin Oljanov

**EL LA KONKLUDA PAROLADO DE GEORGI DIMITROV ANTAŬ LA
FAŜISTA TRIBUNALO EN LEIPZIG**

Mi konfesas, ke mi parolas en lingvo kruda kaj rigora. Miaj batalo kaj vivo ankaŭ estis krudaj kaj rigoraj. Sed mia lingvo estas lingvo malkaŝa kaj sincera. Mi kutimiĝis nomi laaĵojn per iliaj propraj nomoj. Mi ne estas advokato, kiu pro sindevigo defendas ĉi tie sian klienton.

Mi defendas min kiel akuzata komunisto.

Mi defendas mian propran komunistan, revolucionan honoron.

Mi defendas miajn ideojn, miajn komunistajn konvinkojn.

Mi defendas la sencon kaj la enhavon de mia vivo.

Tial ĉiu frazo, elparolita de mi antaŭ la tribunalo, estas, tiel diri, *sango de mia sango kaj karno de mia karno*. Ĉiu vorto estas esprimo de mia plej profunda indigno kontraŭ la maljusta akuzo, kontraŭ la fakto, ke tia antikomunista krimo estas atribuita al komunistoj.

La gazetaro ne nur insultis min ĉiamaniere — al tio mi estis indifera, — sed lige kun mi oni nomis ankaŭ mian bulgaran popolon „sovaĝa“ kaj „barbara“; oni nomis min „suspekta balkana subjekto“, „sovaĝa bulgaro“, kaj mi ne povas preterlasi tion silente.

Vere, la bulgara *faŝismo* estas sovaĝa kaj barbara. Sed la bulgaraj laboristoj kaj vilaĝanoj, la bulgara popola intelektularo tute ne estas sovaĝuloj kaj barbaroj. La nivelo de la materiala kulturo en la Balkanaj landoj sendube ne estas tiel alta, kiel en la ceteraj eŭropaj landoj, sed spirite kaj politike niaj popolamasoj ne staras sur malpli alta nivelo ol la amasoj en la ceteraj eŭropaj landoj. Nia politika batalo, niaj politikaj streboj en mia

lando ne staras malpli alte ol en la aliaj landoj.

Popolo, kiu 500 jarojn vivis sub fremda jugo, ne perdante sian lingvon kaj naciecon, nia laborista klaso kaj la vilaĝanoj, kiuj batalis kaj batalas kontraŭ la bulgara faŝismo kaj por la komunismo — tia popolo ne estas sovaĝa kaj barbara. Sovaguloj kaj barbaroj en Bulgario estas nur la faŝistoj. Sed mi demandas vin, sinjoro prezidanto, *en kiu lando la faŝistoj ne estas barbaroj kaj sovaĝuloj?*

Longe antaŭ la tempo, kiam la germana imperiestro Karlo la V-a diris, ke en germana lingvo li parolas nur kun siaj ĉevaloj, kaj la germanaj nobeloj kaj kleraj homoj skribis nur en la latina kaj hontis pri la germana lingvo, en „barbara“ Bulgario la apostoloj Kiril kaj Metodij kreis kaj disvastigis la malnovbulgaran skribon.

La bulgara popolo per ĉiuj fortoj kaj ekskluzive obstine batalis kontraŭ la fremda jugo. Tial mi protestas pri la riproĉataĵoj kontraŭ la bulgara popolo. Mi ne havas kaŭzon honti, ke mi estas bulgaro, kaj mi fieras, ke mi estas filo de la bulgara laborista klaso...

En la XVII jarcento la fondinto de la scienca fiziko *Galileo Galilej* estis starigita antaŭ la severa tribunalo de l' Inkvizicio, kiu devis lin kondamni al morto kiel herezulon. Kun profunda konvinko kaj kuraĝo li ekkriis:

„Kaj tamen la Tero turniĝas!“

Tiu ĉi scienca konkludo poste fariĝis posedaĵo de la tuta homaro.

Nun ni, la komunistoj, povas ne malpli kuraĝe ol la maljuna Galileo diri:



(Daŭrigo de p. 2)

Mi estas profunde konvinkita, ke la organiza volo de la vastaj popoltavoloj kapablas „artefaritan“ transformi en naturan.

Ĉu nia kulturo ne estas „artefarita“ fenomeno?

Tamen — ni ĝisvivis la tempon, kiam, ŝajnas al ni, ke nekultura homo estas fenomeno malamika al niaj celoj, obstaklo en la kreado de plua kresko de la kulturo.

En artikolo „Pro enuo“ M. Gorkij skribas pri A. Semjonov:

„Semjonov en libera tempo „pro enuo“ okupiĝas pri lernado de Esperanto, sed finlerninte ĝin komencis dubi, ĉu ekzistas homoj, parolantaj tian lingvon. Dubo instruas, sen dubo oni ne konvinkiĝas. Pri la ekzisto de Esperanto Aleksej Semjonov konvinkiĝis laŭ tre originala maniero: li sendis telegramon en Esperanto al londona

Por triumfo de la kulturo ni kreas revolucion, fordonas ĉiujn fortojn de nia prudento, de nia volo, oferas nian personan liberon, vivon.

Ĉu oni povas kontesti, ke la lingvo, unueca por ĉiuj homoj, donos potencon antaŭenpuŝon al la procedo de kultura evoluo?

Ne eblas!

Do — oni devas agnoski la neceson de kreo kaj evoluo de tia lingvo“ (pĝ. 25—26).

firmo, komercanta per ĉasaĵoj, kun propono liveri al la angloj frostigitajn tetraojn. La tetraojn li, certe, ne disponis, sed la angloj respondis al li same en Esperanto, do — tiu lingvo ekzistas, kaj scipovante ĝin, oni povas vojaĝi tra Eŭropo“ (pĝ. 72).

A. Vaičiulis

El „Horizonto de Soveta Litovio“

n-ro 3/1971

ESPERANTO EN LA FAŝISTAJ MALLIBEREJOJ

Dum la faŝista reĝimo en nia lando centoj da politikaj malliberuloj lernis Esperanton. Tiutempe en ĉelo de la malliberejo de Stara Zagora restadis ankaŭ la juna pentristo Krum Dermen-

HELPU DISERTACION!

Studentino petas kontribuojn por disertacio je temo „Metodiko certigi plej konvenan funkcikapablon de elektra kaj motoraj lokomotivoj“. Bonvolu ĝis la 30. 9. 1972 skribi al aĉreso: Eva Chvostova, str. Engelsova 289, Podebrady d. Nymburk, Ĉeĥoslovakio.

ĝiev el Blagoevgrad. Li desegnis siajn samĉelanojn dum ili lernis la lingvon. K-do Dermengiev nun estas elstara skulptisto kaj loĝas en Sofio.

La skizo, kiun ni donas ĉi tie, estas farita la 31-an de majo 1935. Ĝi prezentas tri el niaj kamaradoj, aktive lernantaj Esperanton: (de maldekstre) Vladimir Levkov, Nikola Aĥĉijski kaj Donĉo Lisijski (ĉiuj tri loĝas nun en Blagoevgrad).

Ĥr. Gorov

„Kaj tamen ĝi turniĝas!“
La rado de la historio
turniĝas, moviĝas antaŭen...

Kaj tiun radon... oni
sukcesos haltigi nek per
ekstermoj, nek per mallibe-
rejoj, nek per mortverdiktoj.
Ĝi ruliĝas kaj ruliĝos ĝis
la definitiva venko de la
komunismo!

El la bulgara: Kunĉo Vâlev



*Okaze de 250 jaroj de
la naskiĝo de Otec Paisij
kaj 210 jaroj de lia
„Historio slav-bulgara“*

PAISIJ ĤILENDARSKI

Ĉi-jare pleniĝas 250 jaroj ekde la naskiĝo de Paisij Ĥilendarski — unua bulgara renesanculo, kaj 210 jaroj ekde la apero de la verkita de li „Historio slav-bulgara“ (1762).

23-jara la junulo, kies laika nomo restas ĝis nun nekonata, iris al monaĥejoj de Atoso, kiuj tiutempe estis famaj centroj de kultura vivo, trezorejoj de valoraj libroj kaj manuskriptoj, de gravaj historiaj dokumentoj. Kiel monaĥo kaj monaĥeja sendito li multe vojaĝis tra sia sklavigita patrolando por kolekti monhelpaĵojn kaj donacojn. Kaj ĉie, kie li estis — de Tesaloniko kaj Ohrid ĝis Târnovo kaj Svištov, de Ederne kaj Plovdiv ĝis Skopje kaj Ŝtip — li vidis la suferojn de siaj bulgaraj fratoj. Turkoj verŝis ilian sangon, grekoj penadis ilin grekigi. Ĉie rabado kaj incendioj, ĉie maldecaĵoj kaj fimokoj, ĉie turmentoj, kaj mortigoj.. Pereas la bulgara nacio! Kiamaniere helpi sian malfeliĉan popolon? Ankaŭ en Atoso ne estis trankvile... Grekaj kaj serbaj monaĥoj senĉese primokis la bulgaran popolon, ke ĝi estas simpla, malklera kaj ne havas sian historion, ne havas pasintecon...

La patrioto Paisij decidis verki historion de sia popolo, per kiu ne nur defendi la simplajn „plugistojn, ŝafpaŝtistojn kaj metiistojn“, sed ankaŭ vekti patriotisman senton ĉe ili, gardi ilin kontraŭ grekigo. Kaj montri novan vojon, novan estonton — al libera kaj sendependca bulgara ŝtato. Du jarojn li kolektis materialojn,

Ĥilendar-Monaĥejo, kie Paisij komence vivis kaj de kie li ricevis sian nomon.



P A I S I J
de Ivan Vazov

*Ho, malsaĝa kaj sen-
cerba homo! Pro kio
vi hontas nomi vin bul-
garo? Ĉu bulgaroj ne
havis regnon kaj ŝtaton?
Vi, bulgaro, ne lasu v'n
tenti, konu vian devenon
kaj lirguon...*

Paisij (1762)

Obskura pasinto... Jam cent dudek jaroj! *
En la sin' profunda de Atos-montaroj,
rifugej' kaŝita for de l' mond' perfida,
loko por preĝado, ripozo spirita,
kie nur aŭdiĝas la Egea Maro,
aŭ la susuranta konstante arbaro,
aŭ la sonorado de l' preĝejo sankta, —
en ĉelo modesta en dormo dronanta,
monaĥ' nekonata, pala kaj malhela
skribis ĉe flagranta flameto kandela.

Kion li do skribis? Eble panegiron?
Aŭ biografion de iu martiro,
iam komencitan, longe prokrastatan
kaj ĉe la kandelo denove skribatan?
Ĉu li antaŭsignojn enskribis de dio?
Aŭ elpensis vortojn spiritajn de pio
pri iu glorplena miraklofaranto,
egipto aŭ greko, aŭ Atos-loĝanto?
Kial li laciĝis pro laboro peza?
Ĉu li estis saĝa, aŭ eble freneza?
Aŭ ĝi estis peza kanona laboro,
donita al li de l' severa prioro?

Fine li ĝemspiris: „Mi finis ĝin jam!
Historion novan mi verkis kun am'!“
Kaj rigardon ĵetis plenan de adoro
al la verk' finita, longjara laboro,
frukto de maldormo, rezult' de persisto
glutinta duonon de homa ekzisto.

Granda vivolibro! En la mond' pri ĉio
li pro ĝi forgesis, ja eĉ mem pri dio!
Neniam panjo milda unuenaskiton
tiel amrigardis, nek hero' kronita
la unuajn laŭrojn, nek poeto sian
idealon novan, ravan, helradian!
Kaj kiel antikva biblia profeto
aŭ de l' kruda Patmo la ermit'-asketo
decifrant sur la pergamenta tolo
la mallum-sekretojn kaj la dian volon,
li ĵetis rigardon, pala, febrosenta
al la Mar' Egea, profunde dormanta,
kaj levis la paĝojn, kriis per voĉ' laŭta
„De nun la bulgara gento, oni sciu,
historion havas kaj iĝas nacio!
El mia skribaĵo la popol' sciigos,
ke ĝi estis granda kaj denove iĝos,
ke de Budapeŝto ĝis Atoso sankta
estis rekonata nia leĝo granda.“



Legu vi kaj sciu, kion niaj sanktaj
 avoj iam faris en ĉi tiu lando,
 ke kun multaj regnoj ili lukti devis,
 kaj de reĝoj fortaj tributon ricevis,
 kaj ke estis granda nia ŝtat' iama;
 ke Boriso sankta iĝis reĝ' kristana,
 kaj Aseno templojn konstruis kaj flegis
 kaj sendis donacojn; Samuilo pekis
 kaj animon sian perdis en l' infero,
 eniris Eladon post Dures-konkero.
 Legu vi kaj sciu pri reĝo Ŝiŝmano,
 kaj ke nian regnon prenis fremdlandano;
 pri Ivano Rilski, kies korpo sankta
 estas eĉ hodiaŭ miraklofaranta;
 kiel Krum disbatis Nikiforon iam,
 ruĝan vinon trinkis el kranio lia,
 kiel Simeono la hungarojn venkis
 kaj al li Bizanco time riverencis.
 Kaj li estis granda sciencul' talenta
 kaj neniam ĝenis sin pri l' lingvo genta,
 kaj kiam li havis nenion por venki,
 en ripozaj horoj ŝatis librojn verki.
 Legu do kaj sciu, kion skribis mi
 el legendoj, libroj multaj, tie ĉi,
 legu, fratoj miaj, por ke vin ne moku
 la fremduloj kaj fieri ne arogu...
 Prenu mian libron — testamenton mian.
 Oni ĝin reskribu, multobligu ĉiam,
 disvastigu ĉien tra kampoj kaj valoj,
 kie vivas, veas, pereas bulgaroj.
 Estas en ĝi graco kaj revelacio,
 ĝi instruas nin kaj inspiras pri ĉio,
 ne bedaŭros tiu, kiu legos ĝin,
 kiu ĝin ekkonos, scios li sen fin".

Tiel flustris li en la kaŝejo ĉela,
 kun rigard' fiksita al estonto hela,
 kiu multajn mesojn, preĝojn preterlasis,
 sed neniam sian anserplumon lasis,
 kontraŭ la kanono kaj la sonoril'
 laboris senlace, sen dorm', sen trankvil'.
 Tiel flustris antaŭ cent kaj dudek jaroj
 tiu atosano por eden' netaŭga
 kaj tra la mallumo ĵetis tiun scion —
 fajreron unuan en popolkonscion.

El la bulgara: Asen Grigorov

* 120 jaroj ĝis 1882, kiam Vazov verkis sian poemon pri Paisij, kiun ni donas ĉi tie kun mallongigo.

El letero el USSR


Jam delonge mi bezonas starigi kun vi pli intiman kontakton...

1. Nia urba ĵurnalo enkondukis konstantan rubrikon pri Esperanto. Kompreneble, ni uzos por ĝi ankaŭ materialojn, aperintajn en „BE“. Jen la debuto — mallongigita traduko de la artikolo de R. Konstantinova el „BE“, n-ro 7-8/1971.

2. Ni ĝojas pri viaj abonsukcesoj — 5000 estas cifero! Ankaŭ ni, sovetianoj, multe kontribuas por la abonkampanjo al „BE“. Ekzemple nur nia Esperanto-klubo de Ufa pasintjare kolektis ĉ. 100 abonojn. Same ĉi-jare.

3. Gratulojn pro la plibonigo de la enhavo de „BE“...

Boris Kolker, prezidanto de Soveta Esp-aj Junulara Movado (SEJM)



Zograf-Monaĥejo, kie Paisij verkis sian historion.

atingante eĉ Aŭstrion-Hungarion — kaj ĉie notis ĉiun vorton, kiun li trovis pri Bulgario.

Reveninte en Atoson, Paisij fermis sin en la ĉelo kaj komencis verki, forgesante la eksteran mondon. Trolacigita, malsata, kun nestabila sano, sed kun firma volo kaj flama patriotisma sento li tenis la anserplumon kaj vicigis vorton post vorto... Tiel naskiĝis la „Historio slav-bulgara“ — la unua historio de nia popolo. Montrante la gloran pasintecon de la bulgaroj, Paisij flampasie alvokas lin konsciiĝi, fieri pri sia nacieco kaj labori por reakiri la perditan liberon kaj s'n dependeco.

Li komencis persone disporti tiun ĉi mane skribitan historion tra la lando, donante al ĉiu deziranto reskribi ĝin. Ĝis nun estas malkovritaj 50 tiaj reskriboj.

Per sia „Historio“ Paisij montris vojon al kultura kaj politika liberiĝo de la bulgara popolo, pro kio li estas konsiderata la unua ideologo de nia naciliberiga batalo. Per sia verko li metis la komencon de la bulgara historiografio kaj de la nova bulgara literaturo.

Kunĉo Valev

Estimata kamraro redaktoro!

**LA POPOLA INSTRUISTO, JUNULARA
GVIDANTO KAJ REVOLUCIUO STOJU
LJONDEV**

Lia biografio ne estas longa, sed en ĝi brilas aŭdaco de juneco, sinofero kaj herceco.

Stoju naskiĝis je la 23 de junio 1913 en patriota familio. Li estis ankoraŭ suĉinfano, kiam liaj gepatroj kun sia multnombra idaro estis devigitaj



forlasi la naskiĝvilaĝon Dukli, regiono de Ser (en greka teritorio) por savi sin de la grekaj ŝovinistoj. La familio translokiĝis en la ĵusliberigitan parton de Bulgario kaj ekloĝis en mizera dometo en urbo Nevrokop (nun Goce Delĉev).

Ankoraŭ bebo Stoju restis sen patrinkareso. La mortintan patrinon anstataŭis lia plej aĝa fratino, apenaŭ 10-jara. Stoju finis siajn studojn en la elementa lernejo kaj komencis studi en la meza pedagogia lernejo en la urbo.

¹ Koburgoj — t. e. la Dinastio de Koburgoj (la bulgaraj reĝoj Ferdinand kaj Boris III — de germana deveno).

² Rems—RMS (Laborista Junulara Unuiĝo) — organizaĵo de la junaj komunistoj en kapitalisma Bulgario.

Peza estis la vivo de la multmembra orfa familio. Ĉefa laborokupo estis la tabakproduktado, kiu plej aktive partoprenis ankaŭ la malgranda Stoju — li studis, plantis, plukis kaj aranĝis ĉe petrola lampo la foliojn de la orienta tabako.

En la pedagogia lernejo Stoju manifestiĝis kiel kapabla junulara organizanto. Li sisteme kaj obstine disvolvis sian intelekton kaj pliriĉigis sian kulturon. Regule li legis nelegalan literaturon kaj la progresemajn ĵurnalojn „Pogled“, „Relief“ k. a., kiujn li aktive disvastigis inter siaj kamaradoj kaj la tuta loĝantaro.

Liaj samaĝuloj fieris pri li kaj nomis lin „la filozofo“, ĉar li impresis ĉiujn — lernantojn kaj instruistojn — per siaj konoj pri la historio, per sia talento verki poezion kaj pentri, per sia kapablo polemiki kaj defendi la justecon.

En publika kunveno en 1930 Stojkata (kiel kamaradece ni nomis Stoju) kondamnis la entombigan politikon de la Koburgoj¹ kaj la hombuĉistojn de Mihajlov, kulpuŝojn pri la katastrofo de Makedonio. Tio donis motivon al la polico kaj la furiozanta Mihajlov-bandaĉo aresti kaj kruele torturi lin. La unua batalbapto de la juna remsgvidanto² Stoju kiel revoluciulo ne malkuraĝigis lin, sed donis al li novajn fortojn en la batalo.

Viglan agadon li disvolvis en la Lernanta Abstinula Societo „Trezven Makedonec“ (Sobra Makedono).

Stoju kaj mi estis samkvartalanaj kaj samlernejanaj. Per unu jaro mi estis pli juna ol li. Neniam mi forgesas la teruran bildon en la kelo de la polico, kiam oni arestis nin — la tutan estraron de la Abstinula Societo — kaj per la vipoj postulis de ni konfeson, ke sub la firmo „Sobra Makedono“ kaŝas sin la emblemo „Serp-

kaj Martelo“, kaj la Abstinula Societo estas nelegala RMS-organizaĵo. Sed Stoju, nia prezidanto, estis firma kiel ŝtalo. De li prenis ekzemplon la ceteraj. Oni lin torturis diversmaniere: pendigis lin la kapo malsupren, batis lin ĉe la piedoj per vergoj — sana loko ne restis sur lia korpo. Sed Stoju forlasis la arestejon ankoraŭ pli firma kaj konvinkita pri la justeco de sia batalo.

Dum nelonga tempo li ellernis la internacian lingvon Esperanto kaj eĉ komencis gvidi E-kurson. Li fariĝis ankaŭ prezidanto de la Esperanto-societo en la pedagogia lernejo. Pere de Esperanto Stoju kontaktis kun homoj el la nacilibera movado de Hindio, Ĉinio, el Usono k. a. Se iu kalumniis Esperanton, dirante, ke ĝi ne estas plenvalora lingvo, Stoju ĉiam respondis: por la laboristoj el la tuta mondo, kiuj devas samtempe ŝviti por sia pano, batali konte la kapitalisma sociordo kaj klerigi sin mem, nun Esperanto estas la nura universala lingvo. Ne ekzistas alia lingvo, kiun la laboruloj tiel rapide kaj facile povus ellerni. Esperanto ligas la homojn el la tuta mondo, sendepende de haŭtkoloro, lingvo kaj nacia aparteno. Per komuna lingvo la homoj pli facile kaj pli bonrezulte batalos kontraŭ la subpremantoj kaj ekspluatantoj.

En la lernojaro 1932/33 Stoju absolvis la pedagogian lernejon en Nevrokop, sed la lokaj reakciuloj ne permesis al li labori en sia urbo. Li fariĝis instruisto en vilaĝo Ljaskovo, Smoljan-distrikto. Tie Stoju kun junula flamo kaj sindonemo dediĉis sin al la instruista profesio, klerigante ne nur la infanojn, sed ankaŭ iliajn gepatrojn — bulgarojn-mahometanojn.

Post la politika renverso de la 19 de majo 1934 la faŝista makedona organizaĵo estis malfondita kaj Stoju Ljondev povis reveni en Nevrokop kune kun aliaj forpelitaj liberamaj kamaradoj. Li estis enoficigita kiel instruisto en vilaĝo Sredna, apud

Nevrokop, de la progresema lerneja instruisto Dimitr Angelov (nuna elstara bulgara verkisto). La juna instruisto eklaboris kun ankoraŭ pli granda entuziasmo ĉi tie, kie li estis kreskinta kiel infano kaj junulo.

En 1935, en la tago, kiam oni celebris la faman Ilinden-Ribelon (la 2-an de aŭgusto), la reakciaj regantoj arestis la tutan lokan estraron de la revolucia makedona organizaĵo VMRO. Stoju denove falis en la sange makulitajn manojn de la murdistoj. Suferinte kruelajn torturojn, li tamen restis fidela al sia batalo kaj perfidis neniun. La 11-an de majo 1936 ĉiuj arestitoj estis juĝitaj. Stoju ricevis unu el la plej pezaj verdiktoj — 12 jarojn da severa malliberigo. Sed pro la nehomaj torturoj lia juna korpo re eltenis — en junio la saman jaron la sindona batalanto-kontraŭfaŝisto Stoju Ljondev mortis en la manoj de siaj kamaradoj en la malliberejo. Sed ili ĵuris daŭrigi lian batalon.

Stoju vivis kiel heroo kaj mortis kiel heroo-kontraŭfaŝisto. Li estas unu el la karaj viktimoj, kiujn la bulgara popolo donis en la granda batalo por feliĉo, por komunismo.

Dimitr IZMIRLIEV

ORGANIZA VIVO

DENOVE SUR POSTENO

Je la 15-a de marto en Polski Trâmbeŝ okazis urba kunveno de la loka esperantistaro. Oni pridiskutis la demandon pri revigligo de la E-societo „Progreso“. Ĉeestis k-dino Stanka Palazova de la Urba Komitato de BKP, nova societa membro. Ŝi bondeziris pluajn sukcesojn al la E-Societo kaj promesis plenan apogon al ĝia laboro.

Estis elektita nova estraro: inĝ. Stefan Penkov — prezidanto, Atanas Miĥajlov — sekretario kaj Maria Manolova — respondulino pri la kulturkleriga aktiveco.

La duono de la membroj estas ĝeninstruistoj — bona kondiĉo por restarigo de la tradicioj. Tiamaniere en la urbo jam funkcias 2 E-societoj, du centroj de la nobla porpaca esperantista laboro.

M. Manolova

„VERDA RAKETO“ JUBILAS

La 18-an de marto ĉ. j. la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en urbo Vraca celebris solene sian 5-an datrevenon.

En la grandan salonon de la Urba Partia Domo kolektiĝis pli ol 300 gelernantoj kaj instruistoj. Ĉeestis ankaŭ grupo de 31 studentoj el la Sofia Studenta E-Societo „Vela Peeva“, kiuj speciale venis por la solena kunveno.

En la prezidantaro okupis lokojn: Ĥristo Panĉev — reprezentanto de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj prezidanto de DK de la Batalintoj kontraŭ la Faŝismo kaj la Kapitalismo, Kunĉo Vălev — speciala reprezentanto de BEA, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, Krum Sotirov — estro de fako „Popola Instruado“ ĉe la Distrikta Popola Soveto kaj Dimitr Pârvanov — inspektoro de la sama fako, Ljudmil Janĉev — estro de fako „Arto kaj Kulturo“ ĉe la Distrikta Popola Soveto, Petra Borisova — gvidantino de sektoro „Popola Instruado“ ĉe DK de BKP, Slavĉo Zarkov — direktoro de gimnazio „Ĥristo Botev“ — Vraca, la E-veteranoj Ceno Partov — jam 86-jara, persone konanta Zamenhof, kaj Radoslav Triĉkov — fondinto de la urba E-Societo „Sukceso“ en Vraca, Bojka Batalska — membro de l' estraro de la Bulgara E-Junularo, Dimitr Sertov — prezidanto de la DK de BEA en Vraca, Ljubka Nikolova — prezidantino de la Studenta E-Societo „Vela Peeva“ — Sofio, Enjo Daskalov kaj Georgi Marinov — instruistoj de Esperanto kaj gvidantoj de Lernantaj E-Societoj „Anne Frank“ kaj „Julio Baghy“ en la lokaj teknikaj lernejoj, Ivan Boŝinov — reprezentanto de DK de BEA en M Ĥiljovgrad, la fondintoj de „Verda Raketo“ Jordanka Markova, Lili Georgieva kaj Ĥristina Nedkova, k. a.

La solenan kunvenon malfermis kaj gvidis la lernantino Nina Berĉeva — prezidantino de „Verda Raketo“. Raporton pri la 5-jara agado faris Bojĉo Mladenov — instruisto de Esperanto en gimnazio „Ĥristo Botev“ kaj respondeculo pri „Verda Raketo“. Li notis, ke komence, ekde 1962, ĝi funkciis kiel Lernanta E-Grupo kaj poste, en 1967, transformiĝis en memstaran E-societon. „Verda Raketo“ estas la unua lernanta E-societo en socialisma Bulgario. Ĝia agado estas riĉa kaj varia: ĝi nombras nun 200 membrojn, krei vastajn kontaktojn kun apartaj esperantistoj kaj E-organizaĵoj en dekoj da landoj el la tuta mondo, kelkfoje organizis eksterlandajn ekskursojn por siaj membroj, prezentis 25 E-horojn

pere de la loka radio-reto, aranĝis 6 E-ekspoziciojn por civitanoj kaj lernantoj, multfoje partoprenis per apartaj E-kolonoj manifestaciojn ĉe grandaj tutpopolaj festoj, dum ĉiuj lastaj 5 jaroj okupas la unuan lokon en abonkampanjo de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“ (por la kuranta jaro — 200 abonantoj!) ktp. „Verda Raketo“ aktive kontribuas por la edukado de siaj membroj en spirito de veraj socialismaj patriotismo kaj internaciismo, de humanismo kaj pacamo, kontribuas por la plialtigo de ilia ĝenerala kultura kaj ideo nivelo.

Raporton de la Kontrolkomisiono de la Societo faris Dora Kinova.

Estis akceptita varia plano por agado dum 1972: prepari 5 radio-horojn, organizi du lernant-irojn, ekskurson al la pola urbo Toruń — la kongresurbo de TEJO ĉ. j., aranĝi Vesperon de la Esperantisto, 5-etapan E-ekspozicion, prepari raportojn kaj referaĵojn por edukado de la membroj kaj por propagando de Esperanto inter la lernantaro, fondi „parolantan rondon“, trovi konstantan fotografon por la societaj aranĝoj, abonigi ĉiujn membrojn al „Bulgara Esperantisto“, organizi libervolan labortagon por plibonigi la financon staton de la Societo, subteni bonajn kaj regulajn kontaktojn kun la fakoj „Popola Instruado“ kaj Arto kaj Kulturo“ ĉe la Distrikta Popola Soveto, subteni regulajn kontaktojn kun la Distrikta Komitato por Defendo de la Paco kaj la Urba Komitato de Komsomolo k. a. La membroj de la Societo helpas la klopodojn de la Distrikta E-Komitato eltrovi la nomojn de ĉiuj esperantistoj en la distrikto, pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo kaj fari por ĉiu el ili fidindan biografion.

Oni ankaŭ elektis novan societan estraron,

La prezidantaro



frunte kun la ĝisnuna prezidantino Nina Berĉeva.

Sekvis salutoj. En la nomo de CK de BEA salutis verdraketanojn k-do Kunĉo Vălev. Li substrekis, ke per sia tuta ĝisnuna agado „Verda Raketo“ digne plenumas la testamentojn de la granda filo de nia popolo Georgi Dimitrov pri materiala kaj spirita konstruado de nova, feliĉa socialisma Popola Respubliko Bulgario, pri aktiva batalo kontraŭ la reakciaj militinstigaj fortoj — por kunlaboro kaj amikeco inter la popoloj, por paco en la mondo. En la nomo de CK k-do Vălev enmanigis al „Verda Raketo“ honoran ateston pro ĝia modela agado kaj magnetofonon „Grundig“. Li dekoraciis la bruston de k-do Bojĉo Mladenov per la ora insigno de CK de BEA; per la arĝenta insigno — k-don Slavĉo Zarkov kaj la fondintojn kaj aktivulojn de „Verda Raketo“ Jordanka Markova, Lili Georgieva, Ĥristina Nestorova, Nina Berĉeva; per la bronza insigno 8 aliajn aktivulojn. K-do Vălev bondeziris novajn grandajn sukcesojn al verdraketanoj.

Salutojn prezentis ankaŭ k-do Ĥristo Panĉev — en la nomo de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio, Bojka Batalska — de la Bulgara E-Junularo, Ljubka Nikolova — de E-Societo „Vela Peeva“.

Estis tralegita gratulelegramo de k-do Ivan Abaĝiev — membrokandidato de la Politika Buroo de CK de la Bulgara Komunista Partio kaj sekretario de CK de BKP, ankaŭ gratuloj el Sovetunio, Slovena Socialisma Respubliko (Jugoslavio), Japanio, Nederlando.

La entuziasma solena jubilea kunveno de „Verda Raketo“ — la unua kaj plej granda lernanta E-societo en nia lando, finiĝis per

La ĉeestantaro



riĉa belarta programo en Esperanto kaj bulgara lingvo prezentita de junpionira E-ensemblo el la fundamenta lernejo „Sofroni Vraĉanski“, gvidata de nia fervora s-anino Sneĵana Angelova.

Nina Berĉeva

LA NOVEFONDITA E-SEKCIO EN ĤASKOVO AKTIVAS

En Ĥaskovo la 9-an de februaro 1972 en la nova Distrikta Junulara Domo ĉe la Klubo de la Internacia Amikeco solene estis fondita sekcio „Juna Esperantisto“. La solenaĵon partoprenis ĉirkaŭ 40 gejunuloj-esperantistoj, membroj de la Urba E-Societo „Prof. Asen Zlatarov“, kaj gastoj. Mallongan literatur-muzikan programon prezentis la plej junaj esperantistoj-gelernantoj el la VI klaso, kiuj lernas Esperanton en la Junpionira Domo. La ĉeestantojn salutis la direktoro de la Domo Ivan Draganov. Li bondeziris sukcesojn al la nova Sekcio. Kamarado Georgi Idakiev, prezidanto de la DK de BEA en Ĥaskovo, dankis al la Estraro de la Junulara Domo pro la bonegaj kondiĉoj por agado, kiujn ĝi disponigas al la junaj esperantistoj. Ing. Nikola Uzunov, vicprezidanto de BEJ kaj sekretario de la Urba E-Societo, certigis la estraron de la Junulara Domo kaj ĉiujn ĉeestantojn, ke la junaj esperantistoj el Ĥaskovo pravigos la fidon al ili kaj donos siajn fortojn por disvastigi tra la mondo pere de Esperanto la grandajn sukcesojn de nia socialisma lando, por krei amikajn kontaktojn kun similaj internaciaj kluboj en eksterlando.

En la akceptita agadprogramo estis antaŭviditaj diversaj interesaj kaj variaj iniciatoj. Oni elektis ankaŭ trimembran estraron de la Sekcio kun prezidantino Antonia Spasova, kiu jam komencis viglan agadon. La sekcianoj kolektiĝas ĉiumarde vespere en speciale disponigita ĉambro de la nova konstruaĵo de la Junulara Domo. Unu el la unuaj vesperoj estis dediĉita al Taŝkento, la ĉefurbo de Uzbeka SSR, kun kiu Ĥaskovo delonge havas amikajn kontaktojn. Estis projekciitaj koloraj diapozitivaj pri Taŝkento kaj Samarkando kun surbendigita teksto en Esperanto, kiu en la taŝkentaj geesperantistoj sendis al siaj amikoj en Ĥaskovo. Ing. Uzunov rakontis interesajn impresojn pri sia veturado en

(Sekvas sur p. 13)

TEORIA KONFERENCO DE BULGARAJ JURISTOJ JE ALTA NIVelo

Je la 10 de februaro ĉ. j. en la Domo de la Juristoj en Sofio okazis teoria konferenco, kiun partoprenis juristoj el la Sofia Universitato, la Bulgara Akademio de Sciencoj, la Supera Kortumo de Popola Respubliko Bulgario, la Ĉefa Prokurorejo, la Sofia Advokata Konsilantaro k. a. La konferencon gvidis la prezidanto de la Bulgara Asocio de Juristoj prof. Boris Spasov. Ĝi traktis la perspektivojn por libroeldonado en ĉiuj sektoroj de la bulgara juro.

Lige kun la prezentitaj kaj anticipe trastuditaj 17 prelegoj de la partoprenantoj pri tiu temo kaj post la diskutoj estis faritaj valoraj konkludoj por la eldonado de sciencaj juraj verkoj.

La Bulgara Esperanto-Sekcio de Juristoj pere de sia prezidanto, kiu ankaŭ partoprenis tiun konferencon, prezentis jene sian pozicion:

La tasko de la Bulgara E-Sekcio de Juristoj estas per la internacia lingvo Esperanto popularigi nian socialisman juran sistemon kaj leĝdonadon en fremdlando kaj konigi al niaj juraj medioj la fremdajn jursistemojn kaj leĝdonadon, krei utilajn kontaktojn kun elstaraj juristoj el la tuta mondo kaj tiamaniere doni realan kontribuon en la batalo por paco, internacia kompreniĝo kaj monda kulturo. Unu el la rimedoj por fari tion estas la eldonado de originala Esperanta kaj traduka jura literaturo. Per tiu celo la E-Sekcio bezonas valoran juran literaturon el ĉiuj juraj sektoroj ĉe ni, tamen literaturon, kiu prezentas kontribuon al la jura scienco kaj havas internacian signifon. Tia literaturo la E-Sekcio plezure farus konata al la eksterlanda mondo. Juraj verkoj sen ligo kun la krea scienco kaj la vivo, same kiel naivaj popularigaĵoj, estas nenecesaj.

G. Genčev

CELEBRO DE VELA PEEVA

Mortas homo, kaj sub lia portreto oni metas du datojn kun streketo inter ili: la unua montras lian naskiĝon, la dua — lian morton.

Vela Peeva (16. III. 1922 — 3. V. 1944).

Kio kuŝas malantaŭ la malgranda streketo? — Unu vivo — mallonga, sed ŝtorma, plena je heroismo.

Je la 15-a de marto ĉ. j. okaze de la 50-a datreveno de la naskiĝo de l' popola heroino Vela Peeva (kun partizana nomo Penka) en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“ la kom-somola organizaĵo de la Geologa-Geografa Fakultato, kiu portas la nomon de Vela Peeva, kaj la Sofia Studenta E-Societo „Vela Peeva“ organizis solenan kunvenon. Ĉeestis multaj studentoj kaj universitataj instruantoj, la baltalkamaradoj de Vela Peeva generalo Atanas Semergiev kaj Pejo Bozev, ŝia eksinstruistino Mara Sotirova, samkursanoj kaj aliaj gastoj. Ĉeestis ankaŭ ŝia fratino kaj frato.

Koncizan raporton pri la heroo vivo de Vela — la modesta knabino, redaktorino de la loka studenta gazeto „Kleriganto“, studentino de geografio, aktiva esperantistino kaj popola partizanino, faris la studento Boris Kolev.

Rememorojn pri Vela rakontis ŝia frato Todor Peev kaj ŝia fratino Gera Peeva (kun partizana nomo Anka). Maltrankvilaj, kun haltinta spiro, ni, la studentoj, aŭskultis la rakonton pri la lastaj tagoj de la fidela popola filino. Sola, kun vundita kruro, ŝi estis malkovrita de la faŝistoj sur la monto. Post 5-hora malegala batalo ŝi mortigis sin por ne fali viva en la manojn de la murdistoj.

La kunveno finiĝis per belarta programo. Estis donacitaj floroj al la karaj gastoj. Ni disigis silentaj, kun koroj plenaj de admiro pri la juna partizanino, kiu pereis por la libero de nia patrolando, por la feliĉo de nia popolo.

Ljubka Niko'ova
prezidantino de SSES „Vela Peeva“


SIA EN VELIKO TÂRNOVO

La Semajno de la Internacia Amikeco en Veliko Târnovo estis bone aranĝita de E-Societo „Lumo“. La distrikta ĵurnalo „Berba“ aperigis artikolon pri Esperanto, notante ke oni tutmonde organizas SIA-n kaj ke la 25-an de februaro tiukaze oni aranĝas solenan vesperon en la urbo. Per la urba radio-reto oni kelkfoje sciigis pri tiu vespero kaj legis specialan prelegon preparitan de k-do Venelin Drumev.

En la solena vespero partoprenis la E-klaso de k-dino Penka Kateva (sur la foto el la Ekonomia Teknikumo, kiu plenumis riĉan programon el kantoj kaj recitaĵoj).

Kreiĝis sincera, amikeca atmosfero inter la multnombraj esperantistoj kaj gastoj.

N. Najdenov



La 12-aŭ de marto la sofiaj esperantistoj renkontis kun bukedoj kaj gastamo karajn gastojn el Hungario: k-dinon Lilla Mikes—aktorino, membro de la Literatura Teatro en Budapeŝto, k-don Jozsef Máteffy—prezidanto de la Hungara E-Asocio, kaj k-don Otto Nogrady—sekretario de la Budapeŝta Urba Esperanto-Komitato.

La hungara delegitaro venis speciale por la vespero organizita de la Hungara Kulturcentro en Sofio kaj BEA. La vespero estis dediĉita al la nacia festo de la Hungara Popola Respubliko kaj al la bulgara-hungara amikeco. Certe tiu amikeco manifestiĝis ne nur per la plenplena salono de la Klubo de Kulturagantoj, sed ankaŭ per la interesiĝo kaj ĝojo, kiujn montris la bulgaraj esperantistoj, aŭskultante pri la grandaj sukcesoj de frata Hungario. Tre trafe kaj konvinke pri tiuj sukcesoj parolis k-do Otto Nogrady, kiu substrekis, ke antaŭ sia liberiĝo el sub la faŝismo Hungario estis postrestinta agrarlando kaj nun ĝi estas alte disvolvita industria lando kun moderna mekanigita agrikultura turo.

Kortuŝa momento en la Vespero estis la dekorado de niaj gastoj per la oraj insignoj de BEA.

Post la oficiala parto de la Vespero sekvis belarta programo. Ĝin partoprenis la kantistino Maria Angelova, la aktora duopo Belka Beleva kaj Anani Anev kaj niaj hungaraj gemikoj—la aktorino Lilla Mikeŝ kaj d-ro József Mateffy, kiuj prezentis al ni bone preparitan kaj riĉan panoramon de la nova socialisma hungara literaturo.

Ĉe la fino la dekminuta filmo „Fonto Esperanto“ denove translokigis la bulgaran publikon en la neforgeseblajn tagojn de la 51-a E-kongreso en Budapeŝto.

Post la Vespero k-do Ŝipčš—la direktoro de la Hungara Kultur-Instituto en Sofio, donis vespermanĝon, kiun krom la hungara delegitaro partoprenis ankaŭ kelkaj bulgaraj esperantistoj frunte kun k-do Aleksiev—la BEA-prezidanto. La vizito al monto Vitoŝa kun ties blanka neĝo kaj forta suno aparte plezurigis niajn gastojn. La spektaklo de la baletstudio „Arabesk“ ankaŭ tre plaĉis al ili.

La 15-an de marto la hungaraj amikoj forflugis kun manoj plenaj je floroj, esprimante fortan deziron vidi nin en Budapeŝto. Ĝis novaj renkontoj, karaj hungaraj samideanoj!

Bojka Batalska

NOVAJ ESPERANTO-SOCIETOJ

KASPIĈAN. En la kunsidhalo de la Popola Soveto de urbo Kaspiĉan okazis fonda kunveno de urba Esperanto-societo.

El la Distrikta E-Komitato de Ŝumen ĉeestis la prezidanto Atanas Bojaĝiev kaj d-ro Ilkov. Ĉeestis ankaŭ Canko Murgin—lektoro de Esperanto en la Supera Pedagogia Instituto en Ŝumen.

Antaŭ la ĉeestantoj pri la signifo de la Internacia Lingvo parolis k-do Bojaĝiev. Li klarigis ankaŭ la plej gravajn artikolojn de la asocia statuto.

Dediĉe al la 90-a naskiĝtago de la eminenta filo de la bulgara popolo kaj amiko de Esperanto Georgi Dimitrov kaj okaze de la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj oni unuanime decidis fondi E-societon. Kiel prezidanto estis elektita Toŝko Enĉev—oficisto en la Popola Soveto, kiel sekretario—Ivanka

Nikolova. K-do Kiril Kirĉev proponis, ke la nomo de la novefondita E-societo estu „Pliska“—la unua bulgara ĉefurbo, troviĝinta proksime de Kaspiĉan. La propono estis unuanime akceptita.

Cvijatko Todorov,
Ŝumen

KALOFER. Je la 12-a de marto en Kalofer estis fondita nova E-societo. Tie aktive laboras la instruistino Kalinka Ĥaritonova. Dum la kuranta lernojaro ŝi denove gvidas E-kurson por gelernantoj en la gimnazio. La gekursanoj estas la kerno de la novefondita E-societo, kies membroj estas 25. En la fonda kunveno ĉeestis la sekretario de DEK en Plovdiv k-do Miĥail Danĉev. Estis elektita estraro de la societo kaj akceptita plano por la estonta agado de la junaj entuziasmaj esperantistoj.

F. Miĥajlova
Plovdiv

(Daŭrigo de p. 11)

Sovet-Unio pasintjare, kiam li vizitis la XIII-an Someran Esperantistan Junularan Tendaron-Seminarion en Kiev.

Nun ni aranĝas ekspozicion kun fotoj pri Taŝkento, en la antaŭsalono de la Domo. Baldaŭ okazos Vespero de la Juna Esperantisto kaj Filatelisto kune kun la Sekcio de la Junaj Filatelistoj ĉe la Junulara Domo. En proksi-

maj tagoj ĉe la Domo ekfunkcios nova E-kurso por komencantoj kun gvidanto inĝ. Blagovesta Uzunova.

Karaj junaj amikoj el la mondo, ni volas korespondi kun vi kaj ni invitas vin skribi al nia adreso: Mladeŝki Dom, Sekcio Esperanto, Ĥaskovo, Bulgario.

Antonia Spasova

LA ESPERANTISTA MOVADO EN LA DISTRIKTO DE SMOLJAN

de Jordan Jordanov

prezidanto de la Distrikta Komitato de BEA — Smoljan

Frue la internacia lingvo Esperanto trovis adeptojn ankaŭ en Smoljan-distrikto. Jam en 1900 Vâlko Uzunov, instruisto en vilaĝo Ŝiroka Lâka, lernis Esperanton kaj korespondis



Neno Abaĝiev

kun ĝia kreinto d-ro L. Zamenhof. En 1906—1907 ankaŭ Stojan Marev el Ĉepelare lernis la lingvon kaj kelkajn jarojn instruis ĝin. En 1910 kiel lernanto en Istanbulo Esperanton lernis la smoljarano Petr Pamporov kaj aktive komencis disvastigi ĝin. Li gvidis multajn kursojn ne nur en nia lando, sed ankaŭ en aliaj landoj.

Organizitan E-movadon en la distrikto de Smoljan tamen kreis la administranto de la loka forstejo Neno Abaĝiev en 1927, kunvenigante 16 progresemaĵn gejunulojn, al kiuj li instruis Esperanton. En la sama jaro li fondis la unuan E-societon en urbo Smoljan, kiu ricevis la nomon „Rodopa Stelo“. La lecionoj kaj la kunvenoj de la Societo okazis en la razejo de la juna esperantisto Georgi Kenov. Unu el la plej diligentaj kursanoj estis Rajĉo Daskalov, kiu anstataŭis la lektoron dum lia foresto.

La sekvan jaron en urbo Ustovo ekfunkciis a dua E-kurso, gvidata de l' agrokonomo Minju

Edrev. Ĉe li studis Esperanton la estonta partizana komandanto Bratan Ŝukerov, kiu propagandis aktive la lingvon en la gimnazio de Rajkovo. La polico ne povis toleri la aktivan agadon de l' esperantistoj kaj malfondis la societon, samtempe arestante ĝian prezidanton Neno Abaĝiev.

En 1931. kiam la aktiva esperantisto P. Pamporov revenis al sia urbo, la „Rodopa Stelo“ restariĝis kaj la E-kursoj en Smoljan, Ustovo kaj Rajkovo denove ekfunkciis. Kiel lernanto en la gimnazio de Rajkovo studis Esperanton ankaŭ la poeto-partizano Kiril Maĝarov. Pri ĉi tiuj kursoj skribis ĵurnalo „Krasnogor“ (n-ro 5/1932). Tiam oni ricevis la E-revuojn „Internaciisto“, „Balkana Laboristo“ k. a. kaj korespondis kun esperantistoj el Sovetunio, Ĉinio, Francio, Germanio k. a.

Interesa estas la korespondado de la instruisto Angel Spasov el Rajkovo. En siaj leteroj al la soveta verkisto Jakov Vlasov li donis veran bildon pri la mizera vivo de la rodopanoj.

En vilaĝo Turjan Atanas Toĝorov kunvenigis la pli klerajn gejunulojn kaj en 1938—1939 instruis al ili Esperanton.

La komandanto de la landlima posteno „Konsko“ Diĉo Petrov organizis por la soldatoj E-kurson, mem havigante al ili lernolibrojn. Poste kun ĉiuj soldatoj kaj oficiroj D. Petrov kreis la unuan soldatan partizanan batalionon „Ĥristo Botev“.

En Smoljan-regiono, kiel en ĉiuj partoj de la lando, la supreniro de la E-movado komenciĝis post la liberigo el sub la faŝismo en 1944 kaj speciale post la proklamo de Smoljan-distrikto en 1959. Per la helpo de la Bulgara Komunista Partio kaj de la Popola Soveto la E-Societo en Smoljan disvolvas aktivan agadon. Ĉiujare ĝi organizas kursojn de Esperanto, helpas por la aktivigo de la esperantistoj en la distrikto kaj por la fondo de novaj E-societoj. Por ĝuste gvidi la societojn kaj por aktivigi ilian diversflankan agadon, en Smoljan laŭ decido de BEA-oni fondis Distriktan Komitaton. Tio multe kontribuis por la plimultiĝo de la E-societoj al 15, por la realigo de multaj utilaj iniciatoj — ĉiujaraj internaciaj E-kursoj kaj ferioj en Pamporovo, fakultativa instruado de Esperanto en kvin lernejoj de la distrikto, eldono de turista atlaso de la Distrikto en Esperanto k. a. Antaŭstaras nun ankoraŭ pli granda tasko: bona aranĝo de la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj en Smoljan komence de julio 1972.

Kun siaj ĉiam verdaj koniferaj arbaroj, riĉaj herbejoj, ĉarma panoramo, originala arki-



JUBILEA VESPERO EN RIGA E-KLUBO

La 23-an de februaro en Riga, en la Latvia Respublika Kulturdomo de Klerigaj kaj Sciencaj Agantoj okazis la jubilea vespero de la 15-jara E-movado en Soveta Latvio. La solenan vesperon malfermis la vicprezidanto de la Riga E-Klubo M. Burgmeister. Pri la E-movado en Soveta Latvio prelegis la prezidanto de la E-Klubo Ed. Jaunvalks. Dum la pasintaj 15 jaroj la latviaj esperantistoj faris gravan laboron, eldoninte plurajn esperantaĵojn kaj dissendante ilin al multaj landoj. Aperis bonaj recenzoj pri „Latva Poezio“, „V. I. Lenin kaj la revolucia movado en Latvio“ de A. Drizulis, „En la frata familio de la sovetaj popoloj“ de V. Rubenis, „Voĉoj de Soveta Latvio“ k. a. Versaĵojn de L. Jevsejeva kaj Elvira Lippe oni povas legi en multaj revuoj, same tradukaĵojn el la latva literaturo. En la respublika gazetaro ofte aperas priesperantaj artikoloj — precipe sindone laboras tiurilate J. Gold. La Latva Radio ofte disaŭdigas pri diversaj E-aranĝoj. Dum la 15-jara periodo estas organizitaj pluraj E-kursoj sub la gvido de N. Vika, Ed. Jaunvalks kaj F. Garinš. Latvaj esperantistoj aktive laboris sur la kampo de la internacia agado, organizinte Baltlandajn E-Tendarojn kaj kunvenojn, partopreninte diversajn E-aranĝojn en Sovetunio, UK de Esperanto kaj E-feriojn en Hungario, Finnlando kaj Pollando ktp. Dank' al la afabla helpo de esperantistoj, kiuj donacis librojn kaj revuojn, en la Riga Fremdlingva Biblioteko unufoje en la monato okazas priesperantaj prelegoj por neesperantista publiko. Vigle laboras la E-klubo en urbo Liepaja (prezidantino L. Lange), junaj esperantistoj en la Ziemeņa 8-jara lernejo (gvidante — la vicprezidanto de la lernejo A. Kubulnieks), la Junulara E-Rondeto „Radieto“ (prezidanto A. Medinš), esperantistoj en Cesis Valmiera, Smiltene, Aluksne kaj aliaj lokoj.

Dum la solena vespero la ĉeestantojn salutis k-do Mezš (Liepaja), V. Zibenkes (Dagestano) kaj S. Jansanžav (Mongolio). Oni tralegis multajn ricevitaĵajn salutleterojn. Veteranoj de latva E-movado estis honoritaj per librodonaĵoj.

En la solena vespero estis malfermita fotoekspozicio, respegulanta la latvan E-movadon. Fotojn por ĝi afable disponigis k-do A. Strautmanis, kiu la saman vesperon estis honorita lige kun sia 60-jara jubileo.

Saulcerite Neilande

tekturo, renovigitaj loĝlokoj, fama gastamo kaj supreniranta esperantista movado Rodopi-montaro estas rava.

Por kompreni tion, oni devas ĝin vidi kaj ĝui.

„MI ESTAS PELÉ“

Antaŭ nelonge en Brazilo aperis la aŭtobiografia libro „Mi estas Pelé“. La libron eldonis la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio-de-Janeiro en traduko de Francisko Almada. La prologon (biografio de la Esperanta aŭtobiografio de Pelé) verkis Roberto das Neves,



kiu interalie rakontas pri sia vizito en Bulgario en 1968. Li informas, ke planas verki libron „Paradizo por esperantistoj“, en kiu li rakontos pri Bulgario, „pri mia vizito en tiu lando, la plej simpatia el ĉiuj de mi vizititaj“. Do ni atendas senpacience la aperon de tiu ĉi libro de nia amiko.

En la prologo das Neves rakontas, ke la vera nomo de Pelé estas Edson Arantes Do Nascimento, ke la mondfama Futbal-Reĝo naskiĝis en la urbeto Tri Koroj, ŝtato Minas Jerais, Brazilo, je la 21 de oktobro 1940, filo de humilaj gepatroj: Dondeto (lerta futbalisto, kiu lin instruis ŝoti per la maldekstra piedo, laŭ la rakonto de Pelé mem en ĉi emociga memolibro) kaj s-ino Celeste.

Pelé, kiel la tuta mondo lin konas, venkis ĉiajn rekordojn en futbalo, sporto, kiun li konkeris preter ĉiuj limoj de la imago.

Famiĝinte kiel piedpilkludanto de enlanda knaba teamo de „nudpieduloj“ en la urbeto Baŭruo, nehavante ankoraŭ 18 jarojn, li unuan fojon fariĝis monĉampiono en Svedio, 1958.

Poste Pelé partoprenis, same triumfe, en

Ĉilio (1962), kiam li konkeris la titolon de duobla mondĉampiono, kaj fine en Meksikio (1970), kie li konsekriĝis triobla mondĉampiono.

Kiel sportisto Pelé estas luma ekzemplo por la junaj generacioj. Ni povas esti fieraj, ke la Esperanta eldono de lia sensacia memorlibro estas riĉega je detaloj, interesaj por la infana kaj sportista psikologioj. Estas sciiginde ankaŭ, ke Pelé cedis malavare senpage al la kooperativo siajn aŭtorrajtojn pri la Esperanta eldono.

En sia memorlibro Pelé emfazas, ke li neniam fumas kaj trinkas arkoholaĵojn, ke la nikotino kaj la alkoholo ne konvenas al sportisto, kies ludkapablon tiuj venenoj reduktas.

La traduko estas bona, glata kaj legiĝas facile, alloge.

Al la libro estas aldonitaj kelkaj ilustraĵoj kaj letero al Pelé de la Sofia Studenta E-Societo „Vela Peeva“. La letero estas skribita dum la IX Monda Festivalo de Junularo kaj Studentoj por Solidareco, Paco kaj Amikeco en Sofio 1968, kie reliefigas la subskriboj de niaj junaj Esperanto-aktivuloj Bojka Batalaska, Kiril Velkov, Petr Todorov, Dimitr Jdrakov, Angel Todorov k. a.

Intervjuita Pelé diris jenon pri Esperanto: „Esperanto estas tre utila al la sportistoj, ĝenerale por ilin alproksimigi kaj faciligi al ili la interrilatojn amikajn kaj sportajn“.

Pelé aparte esprimis sian deziron lerni Esperanton.

Al tiu interesa libro ni deziras vastan disvastiĝon kaj penetron speciale en la sportajn rondojn.

Ivan Sarafov

EN MOSKVA INTERNACIA E-KLUBO

La Moskva Internacia Esperanto-Klubo regule okazigas renkontojn de esperantistoj el diversaj landoj.

Antaŭ certa tempo gastoj de la Klubo estis esperantistoj el Bulgario, Hungario, GDR. Ili kun granda intereso aŭskultis prelegon de la prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) — Nikola Aleksiev. Li rakontis pri la agado de MEM, pri ĝiaj kontaktoj kun la Tutmonda Packonsilantaro. N. Aleksiev substrekiis, ke la partopreno en la laboro de MEM estas tasko de ĉiuj E-organizaĵoj en la socialismaj landoj.

Pri la E-movado en la Germana Demokratia Respubliko rakontis la prezidanto de la Centra Laborrondo Esperanto en GDR s-ano Rudi Graetz.

J. Gold

GELERNANTOJ EN DONECK LERNAS ESPERANTON

Ĉi-jare Donecka Tuturba Internacia Klubo ĉe la Urba Komitato de Komsomolo aktivis ĉefe en la lernejoj kaj aliaj oficialaj organizaĵoj. Estas jam bonaj rezultoj.

En la mezlernejo n-ro 103 sur la bazo de la lerneja internacia klubo „Globus“ estas organizita multnombra E-kurso por ĉiuj anoj. Esperanton lernas ankaŭ kelkaj geinstruistoj de fremdaj lingvoj. E-lernolibrojn kaj aliajn esperantaĵojn helpas akiri la Tuturba Internacia Klubo.

Simile ni sukcesis agadi ankaŭ en la mezlernejoj n-roj 138 kaj 5. Nun ĉiuj novaj komencantoj atendas amikajn leterojn el la tuta mondo. Skribu al ili laŭ la anoncetoj en „Deziras korespondi“ de ĉi tiu numero de „BE“.

A. Caricenکو

POR VIA LINGVA PERFEKTIĜO

POR, PRO, AL

Kvankam la prepozicioj en Esperanto havas precize fiksitajn signifojn, multaj esperantistoj, kaj aparte la novaj, ofte eraras en ties uzado.

La diferenco inter *por* kaj *pro* konsistas en tio, ke *por* indikas celon kaj *pro* — kaŭzon. Jen kelkaj ekzemploj por korekta uzado de tiuj prepozicioj:

La parto aĉetis multe da donacoj al siaj infanoj por la Novjaro.

Pro la Novjaro la homoj ne laboras kaj la lernantoj ne lernas.

Tiun bukedon la fianĉo aĉetis por sia fianĉino.

Pro malsano de la patrino la filino havis multajn zorgojn.

Kelkaj neatentaj vortoj estas sufiĉaj por malpacigo inter geamikoj.

Pro malpacigo lia amikino ekploris.

Pro la difektita horloĝo mi malfruis por la vagonaro.

Kelkfoje en unu kaj sama frazo oni povas uzi *pro* anstataŭ *por*, sed tiam la senco ŝanĝiĝas. Ekz.:

Por sia amatino la amanto povas fari ĉion (la amatino ĉi tie estas celo).

Pro sia amatino la amanto povas fari ĉion (la amatino ĉi tie estas kaŭzo).

Por ofte estas sufiĉe proksima al a



ĉarma lando

SLÂNĈEV BRJAG

Unu nomo, kiu elvokas neforgeseblajn rememorojn aŭ vekas revojn por estontaj travivaĵoj. Tio estas tiel, ĉar dum vico da jaroj la turisma komplekso „Slânĉev Brjag“ altiras turistojn el diversaj landoj kaj disponigas al ili abundan sunon, tute etan sablon, varman marakvon kaj allogajn distrojn. Dum la someraj monatoj tie ĉi la temperaturo de la aero estas meze ĉirkaŭ 22°C kaj tiu de la akvo — inter 20°C—28°C.

La plaĝo, kvazaŭ ora rubando, larĝa 100—150 metrojn, etendiĝas je 6 klm da longeco kaj varme karesas la danceman maron. Proksime al ĝi aŭ en la freŝa verdaĵo 98 koketaj hoteloj de „Balkanturist“ bonvenigas siajn gastojn kaj proponas al ili bonajn kondiĉojn por trankvila ripozo. Por la aŭtoturistoj aparte estas 3 kampadejoj kun lignaj bungaloj.

La nutrado estas bone organizita en

(kiu esprimas direkton):

La geedza paro forveturis por Varna.

La geedza paro forveturis al Varna.

La diferenco inter tiuj du frazoj estas tre malgranda, kaj anstataŭ *por* oni povas preskaŭ same bone diri *al* kaj *male*. Sed ne ĉiam! Ekz. la sekvantaj du frazoj ne estas tute egalaj:

Margarita kantas por vi.

Margarita kantas al vi.

Same oni ne devas intermiksi *por* kaj *al* en la frazo:


La gepatroj aĉetis al siaj infanoj multe da donacoj por Novjaro.

Diri male estas erare.

N. Nanov

31 restoracioj kaj multaj pavilonoj. De bonaspektaj magazenoj aŭ butikoj oni povas aĉeti freŝajn kaj bongustajn fruktojn, diversajn varojn, memoraĵojn, gramofondiskojn, librojn k. a.

„Slânĉev Brjag“ estas paradizo por la infanoj. La maro apud la bordo estas malprofunda kaj ili trankvile povas eniri internen. Por ili ekzistas ankoraŭ 3 basenoj kun mara akvo. Por la malgrandaj gastoj estas ankaŭ multaj ludplacoj kun glitejoj kaj luliloj.



Sed ĉu la ripozo povas esti agrabla kaj plena, se mankas distroj? 21 amuzlokoj proponas al la vizitantoj plej variajn distrajn programojn. Ĉiu povas elekti laŭdezire noktan trinkejon „Variete“, popolstilajn ejojn kiel „Ĉuĉura“ (Fontantubo), „Bâĉvata“ (la Barelo), „Vjatarna Melnica“ (Ventmuelejo), „Ĥanska Ŝatra“ (Ĥana Tendo) k. a. Tiu lasta estas tre originala konstruaĵo sur la proksima altaĵo, kun ronda kupolo, de kies terasoj oni kontemplas en la ebena la tutan ripozkomplekson.

(Sekvas sur p. IV)

Ĉefredaktoro: Kunĉo VÂLEV

Redakta Komitato: Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA, Venelin MITEV, Stefka ĤRISTOVA, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-8

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Violeta Stefanova — str. Neofit Rilski 35, Loveĉ (15-jara lernantino en ekonomia teknikum — kun knabinoj el la tuta mondo, certe respondos).

20 junaj geesperantistoj (konstruktoroj, inĝenieroj k. a.) akurate korespondus tutmonde. Komuna adreso: Baza za tehničesko razvitie — Esperanto, *Polski Trâmbzš*.

Hungario

Varga Istvan — *Kiskunfelegyhaza*, Ludas u. 26/a (17-jara lernanto — kun bulgaraj geknaboj).

Pollando

Zenon Marciniak — Wojciehowo, p-ta Krośniewice pow. Kutno, woj. Łódź (27-jara terkulturisto — kun gebulgaroj pri filmoj, junula muziko, sporto, turismo, vilaĝa junularo, bk, fotoj de aktoroj kaj kanzonistoj).

Junaj geesperantistoj serĉas seriozajn korespondantojn sendepende de la aĝo (14–20-jaraj), komence per mallongaj leteroj, sed ĉiam regule. Komuna adreso: Aleksandr Grela, *Nowy Sącz*, *Mieckiewiczza* 37.

Leszek Siega — ul. Lwowska 8 m 17, *Varsovio* (studento en Pedagogia Instituto — kun bulgaraj gestudentoj).

Rumanio

Costel Sterea — *Ploiesti* — 8, str. Elia de Radulescu 16 (32-jara — kun gebulgaroj pri turismo).

Sovetunio

Skribu amase el tuta mondo al multnombra nova Esperanto-grupo. Adreso: „KID“, Mezlernejo n-ro 138, str. Makejevskaja, 340 031 *Doneck*, Ukrainio.

75 komencantaj esperantistoj, anoj de Internaca Klubo, deziras korespondi tutmonde. Skribu al: „Globus“, Mezlernejo n-ro 103, str. Dunajevskogo, 340 039 *Doneck*, Ukrainio.

Junaj komencantaj esperantistoj deziras korespondi tutmonde. Skribu al: Esperanto-grupo, Mezlernejo n-ro 5, 340 015 *Doneck* 15, Ukrainio.

Svetlana Zabuĉina — str. Volgo-Donskaja, 7-V/13, 340 074 *Doneck*, Ukrainio (22-jara, kun ĉi pri literaturo).

Tamara Familnova — str. Volgo-Donskaja 25/1, 340 074 *Doneck*, Ukrainio (juna instruistino — kun ĉi pri literaturo).

Gelernantoj 12–16-jaraj, membroj de de Klubo de Internacia Amikeco, deziras korespondi pri ĉi kun ĉi, interŝanĝi bk, pm, suvenirojn k. a. Komuna adreso: 353 900 *Novosibijsk*, Dvorec Pionerov, Klub „Druĵba“, USSR

Loĉmelis Konrads — *Valmiera*, poŝtkesto 76, Latvio (35-jara fraŭlo — pri sporto, historio, pm.).

Egorov Paŭlo — *Jaunimo* 5, Moletai 234 150, Litovio (16-jara lernanto — kun ĉi pri ĉi, kolektas pm, metalmonerojn, esperantaj-ojn).



Podkoritova Galja — str. Svoboda 121 — 7, *Ĉeljabinsk* (19-jara — pri sporto, modo, estrada muziko, vojaĝoj ktp).

Asta Valaityti — Panerius 78–58, 233 026 *Kaunas*, Litovio (17-jara lernantino — kun ĉi pri ĉi). *Vidu la foton!*

La ŝafantoj de moderna muziko jam scias, ke tie ĉi, en la komplekso „Slânĉev Brjag“, estas organizata la mondfama internacia festivalo de la bulgara estrada kanto „Zlatnija Orfej“ (Ora Orfeo). En junio (de la 3-a ĝis la 7-a) ĉi-tie renkontiĝas kaj vetkantas eminentaj bulgaraj kaj alilandaj plenumantoj de estradaj kantoj.

Por la ripozantoj „Balkanturist“ aranĝas 20 ekskursojn. Jen, tute proksime, je nur kelkaj centoj da metroj, sur eta duoninsulo ligita kun la tero nur per unu ŝoseo, kuŝas la antikva urbo Nesebâr, kie la historio lasis ege interesajn postsignojn sur la fortikaĵa muro kaj en la multnombraj malnovaj preĝejoj. Dum 2 tagoj per aviadilo kaj aŭtobuso oni povas vidi la ĉefurbon Sofio, la montaran parkon „Vitoŝa“ kaj atingi ĝis la historia Rila Monaĥejo. Iuj preferas viziti bulgaran vilaĝon, la riveron Ropotamo aŭ fari promenadon en la maro. Ankaŭ ties deziroj estas kontentigataj.

Kiu feriiis en „Slânĉev Brjag“, tiu memoros dum sia tuta vivo la tagojn pasigitajn sur la mirinde bela parto de la suda bulgara marbordo.

Dimuto